Per la sama numero de la revuo ni informis ankaŭ pri tio ke la esperantista festo de tiu jaro okazis en Avilés, fajne organizita de la Prezidanto de la E-Grupo **ANTAŬEN**, Nicolás Muñiz. Sed, malfeliĉe, tiu kara samideano ne povis ĉeesti la festerojn. Ĝuste la antaŭtagon de la festo li suferis infarkton. Laŭ ekspresa deziro lia kaj de lia familio oni plenumis la planitan festo-programon. Iu el la programeroj estis meso en Esperanto. Dum tiu religia ceremonio la asturaj gesamideanoj speciale preĝis por la resaniĝo de Nicolás kaj poste iu delegacio de la ĉeestantoj adresiĝis al la hospitalo kie li troviĝis; tie oni informis al ili ke la stato de la malsanulo estis mortdanĝera. Ĝuste tiutage, kiam ankoraŭ ne estis finiĝanta la bankedo de la geesperantistoj, ni eksciis pri la forpaso de tiu sindonema aktivulo de nia regiona E-movado.



**Nicolás Muñiz**

En la jaro 2000 okazis la 2a Festo de la Lingvoj de la 14a ĝis la 17a de marto, unu tagon pli ol la antaŭa jaro. Nia **Astura Esperanta Asocio** partoprenis en ĝi per simila stando kiel tiu de la festo de la jaro 1999. Tie ni disdonis materialon propagandante pri la lingva solvo kiun konstituas **Esperanto**. Unu el tiuj propagandiloj estis bildstria arangô kun teksto en Esperanto kaj en la hispana lingvo entenante mesaĝon pri la utileco de la Internacia Lingvo.




Kadre de nia partopreno en tiu Festo de la Lingvoj okazis prelego de nia samideanino D-rino María José Álvarez Faedo pri la temo “Neceso de internacia lingvo tra la historio”. La kompletan tekston de la prelego oni povas vidi en la 75a numero de **HELECO**.

Krome, apartaj grupoj de gestudentoj kaj gelernantoj vizitantaj nian standon ricevis iaspecan unuan lecionon pri la esperantaj kulturo kaj lingvo.

Alitipa agado, ankaŭ cele de la propagando kaj diskonigo de nia afero, estas tiu rilate al la informmedioj. En tiu jaro 2000, membroj de la estraro de **AEA** estis intervjuataj de RADIO-SELE kaj la Gijona Televido. Ni profitas tiajn okazojn por diskonigi nian mesaĝon ke ekzistas lingva solvo por la interrilatoj inter la homoj de la diversaj popoloj kaj kulturoj.

La 54-paĝa numero 76a de **HELECO,** en kiu oni informas pri la okazintaĵoj de la jaro 2000, publikigas ampleksan intervjuon al Faustino Castaño pri la **59a Hispana Kongreso de Esperanto**, okazinta en la apudMadrida urbo de San-Sebastián-de-los-Reyes, kiun li ĉeestis, kaj alia al Julio Argüelles pri la **85a Universala Kongreso de Esperanto**, okazinta en la Israela urbo Tel-Aviv, en kiu li partoprenis.

Ĉio koncerne al la vivo de nia E-grupo, kaj de la Asturia esperantismo ĝenerale, inter oktobro de la jaro 2000 kaj oktobro de 2001 estas priskribata en la 77a numero de **HELECO**, ankaŭ ĝi 54-paĝa. Dank’ al tiu fonto ni povas informi ke la Zamenhofa Tago de la jaro 2000 okazis en Gijón, kun ĉeesto de geesperantistoj el la du asturaj urboj kie estas E-grupoj. Estas en nia fotokolekto iu fotografaĵo de la partoprenintoj en tiu festo, farita en la strato Esperanto. Ni publigas tiun foton en la sekva paĝo. Sed estas tie alia foto, tiu de samideano Alcibiades González Meana. Estas grava kialo por speciale memori pri li ĉiokaze.

La 10an de decembro de la jaro 2000 li forpasis en Oviedo, estante 83-jaraĝa. Lia nomo estas ligata al la renaskiĝo de la esperantisma movado en Asturio post la kolapso kiun signifis por la internacia lingvo en Hispanio la Civila Milito. Kune kun sia frato Adonis kaj aliaj simpatiantoj de nia afero, li fondis en El Entrego (Langreo) iun Esperanto-grupo kiu jam ne plu ekzistas sed kies membraro nutris nian gijonan E-grupon antaŭ kelkaj jardekoj. Alcibiades estis dumlonge kunlaboranto de nia revuo ĉefe en temoj pri arto kaj literaturo.